

Oficiala organo de Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kai (UHA)

# Oomoto

n-ro 457  
2010  
jan.-dec.



# Memora Entrepreno por la 120-jara Jubileo de la Fondiĝo de Oomoto (2)

Oomoto celebros la 120-jaran jubileon de la fondiĝo en la jaro 2012, kaj por jubilei tion Oomoto nun entreprenas konstrui novajn preĝejon kaj oficejojn.

En la lasta jaro, en nia revuo Oomoto #456, ni raportis pri la unua parto de la entrepreno. Ĉi tie ni raportas pri la posta progreso de la entrepreno: la konstruo de la nova oficejo kaj salono kompleta en oktobro 2010, kaj la konstruo de la nova aŭditorio por prelego elfarota antaŭ 2012.

La Spirita Gvidantino nomis tiujn konstruaĵojn: “Miroku-Domo” kaj “Oomoto-Domo”.



*Miroku-Domo*





*Aŭditorio en Miroku-Domo*

*Ekspoziciejo en Miroku-Domo*





*Ponto al Oomoto-Domo*



*Oomoto-Domo*



# ***La Esperanta Utafesto de Oomoto en Brasilia***

## ***Unuafoje en neĵapana lando***

***MAEDA Shigeki***

### ***Prosperis Utafesto kaj aliaj koncernaj eventoj***

En la 13-a de okt. en ĉi tiu jaro (2010), en Brasilia, la ĉefurbo de Brazilo, okazis la “Esperanta Utafesto de Oomoto” en la etoso, plena je gratulo pro la 50a datreveno de la ĉefurbo Brasilia. La utafesto havis sian celebrejon en ParlaMundi, la kroma konstruaĵo de la templo Piramido.

Anticipante la ĉefan eventon “Esperanta Utafesto de

Oomoto”, okazis la komuna preĝo de religiuloj, organizita de tri organizoj: LBV (Legio de Bona Volo), URI (United Religions Initiative) kaj Oomoto.

Por la Utafeston oni kontribuis pli ol

300 Esperantlingvajn utaojn el 6 landoj kaj ĝin partoprenis entute 485 personoj (200 esperantistoj, 100 Oomotanoj el Japanio, 24 reprezentantoj el 11 religiaj organizoj, 11 reprezentantoj el 8 ambasadoj kaj 150 civitanoj de Brasilia).

En la sekva tago, la 10an horon, en la



Parlamento de Brazilo okazis la omaĝo por Oomoto fare de la Deptita Ĉambro. La estro de la Deputita Ĉambro gvidis la ceremonion kaj oficiale proklamis ke

Oomoto estas religio, tre bona kaj utila por la lando Brazilo.

En ĉi tiu jaro Oomoto Internacia ricevis

## *La unua Esperanta Utafesto*

La unua Esperanta Utafesto de Oomoto okazis en 2007, en Ĉoosej-den, Ajabe, 2 jarojn post kiam la Kvina Spirita



la 5an datrevenon de sia fondiĝo, por festi tion gratulkunveno okazis je la 19a horo en la sama tago (14a) en la urbcentra hotelo. En la kunveno ĉeestis 264 personoj inkluzive de 120 esperantistoj.

Tiamaniere, ne nur la “Esperanta Utafesto de Oomoto”, sed ankaŭ ĉiuj aliaj koncernaj eventoj havis la belan rezulton.

Gvidantino versis jenan utaon okaze de la utafesto en Kameoka, 2005.

Ho, aspiras mi  
al la utaa festo  
ja en Esperant’  
fratar’ de l’ tuta mond’  
Jen sur land’ Jerusalem’.



Estis unuafoje, ke la vorto “Utafesto en Esperanto” aperis oficiale. Kaj, 2 jarojn poste, la esperantlingva utafesto ja realiĝis en la kadro de la internacia evento “Bonvenon al Oomoto 2007!”. Ĉi tiu Esperanta

Utafesto havis tre belan rezulton kun la partopreno de 74 esperantistoj el 13 landoj. Estis tre grava tago, kiam oni vidis ke la plej malnova popola festo de Japanio harmoniis kun la lingvo Esperanto.



Komuna preĝo, Kiso de Paco

## *La dua Esperanta Utafesto*

Ajabe, kie okazis la unua Esperanta Utafesto de Oomoto, estas la sankta tero (tereno), kaj ankaŭ la ĉefurbo Brasilia estas la nova sankta tero de la mondo. En la 1800aj jaroj Sanka Don Bosco, la pastro de Roma Katoliko, antaŭdiris ke en la mezo de la Sud-Amerika kontinento aperos granda lago kaj tie konstruiĝos la nova

Jerusalemo de la mondo. Kaj antaŭ 50 jaroj (en 1960) la antaŭdiro de Sankta Don Bosco realiĝis: en tute primitiva savano konstruiĝis la nuna ĉefurbo Brasilia. Kaj baldaŭ poste oni eksciis ke sub la tero de

Brasilia kuras la grandaj vejnoj de kristalo. Eĉ nun oni elfosas ne nur kristalojn, sed ankaŭ diversajn juvelŝtonojn.

Jen la dua Esperanta Utafesto de Oomoto (la unua Esperanta Utafesto de Oomoto en ne-japana lando)

okazis en tia urbo, kia nomiĝas “la nova sankta tero de la mondo”.

## *La tria Esperanta Utafesto*

Tiel, ĝis hodiaŭ, la Esperantaj Utafestoj de Oomoto okazis en du sanktaj teroj en la mondo. Mi ne estas certa, en kiu lando okazos la tria Esperanta Utafesto de Oomoto. Sed plej dezirinda estas Jerusalemo, Israelo, la sankta tero de l’



Omaĝo por Oomoto en Parlamento

homaro, se ni pripensas la utacon de la Kvina Spirita Gvidantino.

En Mezoriento ankoraŭ daŭre troviĝas la semoj de konfliktoj kaj tial la vojo al la realiĝo (de Esperanta Utafesto en Jerusalemo) ne estas facila. Sed, kiam ni konsideras la estontecon de homaro, nepre necesas la klopodo por paŝi sur la vojo.

La Esperanta Utafesto inkluzivas ĉiujn necesajn kondiĉojn por doni la pacon kaj harmonion al la mondo, t.e. la purigado de la atmosfero (forigo de miasmo), la preĝo al Dio per utaoj, plenaj je sincereco kaj arteco, kaj la funkcio de la paca spirito de la internacia lingvo, ktp.



5-jara jubilea festo de Oomoto Internacia



## **Nordorienta Azia Movado de Esperanto viviĝas pere de la 6-a Azia Kongreso de Esperanto**

**— Azia Harmoniĝo per Esperanto —**

Agou Takaŝi

254 kongresanoj aliĝis el 33 landoj en Ulanbatoro.

Arda varmeco je pli ol 30 gradoj preskaŭ ĉiutage okupis en la urbego Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolio, kie okazis la 6-a Azia Kongreso de Esperanto (AK), de la 19-a ĝis la 23-a de junio, 2010 kun 254 kongresanoj el 33 landoj. La nombro de la aliĝintaj landoj estis la kongresa rekordo, kiun oni ne facie imagis antaŭ kelkaj jaroj.

Inter la kongresanoj troviĝis 70 japanaj esperantistoj, kiuj registriĝis kiel la plej granda nombro: 17 el ili apartenas al Oomoto, UHA (Universala Homama Asocio) kaj EPA (Esperanto-Populariga Asocio). Krome, reprezentante aziajn branĉojn de UHA, 7 gejunaj membroj el 6 landoj (Nepalo,

Bangladeŝo, Srilanko, Barato, Pakistano Filipinoj kaj Japanio) sukcesis partopreni ĝin, malgraŭ tio ke ili multe nervoziĝis alfronti al la vizaj problemoj ĝis antaŭ lasta momento de iliaj efektivaj eliroj el la flughaveno Chinggiskhaan.

La AK havis la lokon kiel la kongresejon en la hotelo Chinggiskhaan, unu el la plej konata kaj granda hotelo en Ulanbatoro. En la malferma soleno s-ro Lee Jung-kee, la prezidanto de Komisiono de Azia Esperanto-Movado (KAEM) salutis al la kongresanoj.

“Azio havas 61 procentoj da loĝantoj sur la tergloba, pro tio la respondeco de azianoj estas tiom granda. Ankaŭ en Esperantujo, ni, azianoj ne povus eviti tiom da rolo. Antaŭ unu monato, finfine KAEM kunlabore kun ĉinaj samideanoj sukcesis lanĉi kurson en Birumo, en kiu lando ĝis nun ne troviĝis Esperanto-



parolanto.

Kiel vi scias, lingva problemo en Azio estas vere serioza. Mi ne dubas, ke la 6-a Azia Kongreso de Esperanto en Ulanbatoro montros la verdan koron kaj solidarecon de azianoj, kiuj sekvas pacon kaj fratecon per neŭtrala lingvo Esperanto”.

## Gratulmesaĝo de Ĉefministro de Mongolio

Koncerne al kongresa riĉigo s-ro Samdan Tsedendamba, la prezidanto de la Mongola Centro de Universala

Homama Asocio (MC), sukcesis akiri la gratulmesaĝon de la ĉefministro de Mongolio, s-ro Sukhbaatar Batbold, utiliginte sian karieron kiel la eksasistanto por la sinsekvaj prezidentoj de Mongolio.

“Azio estas la kontinento ekonomie pliprosperiganta kaj plifortiganta laŭ sia politika influo. Azio estas regiono de diversaj civilizacioj, religioj kaj kulturoj kun riĉaj tradicioj. Tial ni, ĉiuj etnoj kaj nacioj de nia kontinento arde dezirus pacaman kaj harmonian kunvivadon interkompreniĝante unu la alian. Jam tempos!

Vere jam venis tempo celi kaj kuraĝe kunmarŝi por reala Azia harmoniigo kaj



unuigo. Mi multe ĝojas kaj dankas vin pro tio, ke vi kun tiuj noblaj celoj kolektiĝas en mia bela lando, havanta riĉan historion kaj brilajn estonton.

Mi bondeziras ke plene realigu viajn noblajn revojn! En la globalisma epoko progresigante siajn gepatrajn lingvojn kaj kulturojn pere de Esperanto, ni eterne amikiĝu!”

Estus menciinde ke lia gratulmesaĝo ne mal multe kuraĝigis nin, kongresanojn al la progresigo de la Esperanto-movado ne nur en Mongolio sed ankaŭ en Azio.

## Cele al Azia Interkompreniĝo, multlingva sfero

Kongresa temo estas “Azia Harmoniigo per Esperanto”, laŭ kio s-ro Hori Jasuo, la estrarano de UEA faris kongresan paroladon;

“La unua paŝo de KAEM komenciĝis per la eldono de nia revuo “Esperanto en Azio” en majo 1990. Tiu redaktanto ne

estis aziano sed polo, kiu vojaĝis en Azio, kaj eksciis grandan potencon de Azio.

Eble la eldono de nia revuo en 1990 estis hazarda koincido, sed tiu simbolas la malfermon de la nova epoko. Profitante tiun bonan fluon KAEM fondiĝis en 1994



kun 4 landaj asocioj apartenanataj al UEA. En 1996 la unua historia AK okazis en Ŝanhajo, kaj poste ĝi ritume okazis ĉiun trian jaron. Nun, 11 landaj asocio de UEA apartenas al KAEM.

Dum la pasintaj 20 jaroj, dank'al ekonomia progreso en multaj landoj vivnivelo pli kaj pli altiĝis kaj esperantistoj povas vojaĝi eksterlanden por la kongresoj.

Alia grava faktoro estas progreso de komunikado per Esperanto. En la 21-a jarcento eksplode disvastiĝis interreto, kies epoko duoble, trioble grandigis la valoron de Esperanto.

En Esperanto ekzistas ĉio bona: justeco, paco, egaleco, frateco, ktp. Esperanto kreskas nur en paco, do esperantistoj devas labori por paca mondo. Nun venis tempo por harmoniigo surbaze de paco, stabileco kaj disvolvigo, surbaze de

interkompreniĝado en multlingva Azio. Realigon de tiu temo "harmoniiĝo" nur esperantistoj povas fari.

La roloj de Esperanto kaj de esperantistoj estas vere gravaj. Konsciente tiun gravecon, ni lernu, amikiĝu, laboru dum la kongreso kaj revenonte hejmen, faru ĉion por la mondo per nia kara lingvo Esperanto."



## Unuafoje okazigita la fakkunsido de Universala Homama Asocio

Dum la kongreso interesis la ĉefaj programeroj kiel "la malferma kaj ferma solenoj", "Mongola Vespero", "Internacia Vespero" kun 36 fakkunsidoj koncerne al Esperantaj studoj, movado, historio, kulturo kaj religioj.

Kvankam frumatene komenĉiĝis la

fakkunsido de Oomoto, tamen kolektiĝis 60 kongresanoj kiuj ĝuis la prezentadon de la historio, instruoj kaj internacia agado de Oomoto per la videaj filmoj. Plie, ne mankis al ili la prezentado de japanaj tradiciaj artoj kiel la te-ceremonio kaj du ŝimajoj (parto de nooa danco) k.a.

Estas registrinde, ke en la kadro de UK kaj AK, unuafoje malfermiĝis la fakkunsido de UHA, en kiu ni prezentis

la videofilmojn pri "La Paŝo de UHA" en Esperanta versio kaj poste okazigis la oratoran konkurson, al kiu aliĝis 7 junularaj reprezentantoj el 6 landaj branĉoj de UHA.

El tio sekvis, ke f-ino Bat-Amgalan Dulguun, 16-jara altlernejano el Mongolio, kiu havis la 1-an premion de la

konkurso, estis honore invitita de UHA al sia sidejo en Kameoka dum 16 tagoj en la transjaro.

Ŝi intensive lernis ne nur la ideon de UHA kaj instruojn de Oomoto kun la alia mongola esperantisto, f-ino Tumurgardy Oyun Erdene, sed ankaŭ plialtigis sian lingvan kapablon de Esperanto, aktuale partopreninte en la Transjara Kurskunveno de Esperanto, organizita de EPA, inter la 30-a de dec. kaj la 2-a de jan. en 2011.

## Subteno al la AK

Parenteze, la invitinto de la AK estis Mongola Esperanto-Societo, kies prezidanto estas s-ro CHIMEDT SEREN Enkhee kun ĉirakŭ 30 membroj. Inter ili troviĝis apenaŭ 6-7 parolkapablaj esperantistoj, kian realan organizpotencon rimarkinte, s-ro Lee Jung-kee anticipe petis de fervoraj esperantistoj en Azio vastanime subteni ilian origanizan administradon.

Krom tio, profitinte partopreni en la 95-a Japana Kongreso de Esperanto, okazigita en la urbo Ŭakajama antaŭ 3 jaroj, li forte deziris aŭdienci la majstrinon DEGUĈI Kurenai, la spirita gvidantino de Oomoto kaj honora prezidanto de EPA por ricevi de ŝi la promeson de aparta subteno al la AK.

En tia cirkonstanco mi ekdeĵoris de la komenco de januaro en 2009 ĝis nun kiel la konsiliano en la Mongola Centro de UHA (MC), paralele min okupinte je la stimulado por la movado de MC kaj la sbutenado al la AK.

Ekzemple, antaŭ la AK dum unu kaj duona jaro mi konstante gvidis

Esperantajn kursojn en du privataj kolegioj en Ulanbatoro por totale 60 studentoj kunlabore kun MES. Aliflanke, MO iniciatis okazigi ĉiusemajne kvar aŭ kvin fojojn en sia propra oficejo, tiel nomatan "Intensiva Kurso de Esperanto", en kiu 21 junaj kaj maljunaj kursanoj finstudis antaŭ la AK.

Post ĉio 7 gejunuloj el ili servis kiel LKK-anoj de la AK, kia estis konkreta



rezulto de nia komuna kunlaboro kun MES. Krome 6 lokaj oomotanoj okupiĝis pri la kongresa organizado kun senŝanĝa fervoreco.

Ankaŭ ni ne povis forgesi tion, ke Media kaj Internacie Komerca Kompanio, kies estro estas s-ro Barid ANKHBAYAR, la direktoro de MC, estis nomumita kiel la turisma kompanio ekskluzive por la AK kaj ĝi senavare kunlaboris kun LKK cele al la sukcesigo de la AK.



Koncerne al tio, unu semajnon antaŭ la AK tri junaj kursgvidantoj de EPA aliĝis al LKK, por ke ili plenumu taskojn kiel Esperantaj interpretistoj inter japanlingvaj ĉiĉeronoj kaj la kongresaj vojaĝantoj en antaŭ kaj post AK. S-roj

HIRAOKA Jasuŝi, ONITUKA Joŝiaki, kaj OKUŬAKI Toŝiomi, kiuj triope gastis en la ĉambro de iu apartamento dum 16 tgoj en Ulanbatoro, volontule ŝuldis sur sin la kongresajn taskojn,

En la ferma soleno s-ro Lee Jung-kee, la prezidanto de la AK esprimis tiel, ke la 6a-AK estis tre laŭdinda k o n g r e s o dank' al aparta

subtenado de EPA kaj Oomoto. Tio multe honorigis ĉiujn LKK-anojn kaj ankaŭ evidentigis ĉirkaŭ du jaran klopodadon de ĉiuj koncernatoj al la AK.

**La 7-a AK estos en la urbo Tel-Avivo en Israelo en 2013**

Okaze de la ferma soleno s-ino Esti Savan, la reprezentanto de Israela Esperanto-Fedelacio oficiale deklaris inviti la 7-an AK-n al la urbo Tel-Avivo en Israelo en 2013, kiam EPA koincide bonvenigos la 90-jaran datrevenon de sia fondiĝo.

Rememore al tio, ke la majstro DEGUĈI Onisaburo, la kunfondinto de Oomoto kaj la fondinto de UHA/EPA enkondukis



Esperanton en Oomoton en 1923, kaj la sekvantan jaron, 1924, celis al Mongolio por spirite kaj morale unuecigi Azion sur ĝi. Post tio, li havis ideon direkti sin al Jerusalemo,

trapasante okcidentan eŭropon por la sankta misiado.

Neatendite, lia deziro efektiviĝos en la formo de la 7-a AK post du jaroj, kiam ni, oomotaj esperantistoj elkore deziras iel helpi ĝin por realigi la misian revon de la majstro DEGUĈI Onisaburo, la kunfondinto de Oomoto.

# NAO DEGUĈI

*Biografio de la Fondintino de Oomoto*

*1*

Sakae OOIŜI, *tradukis Mathias DALMOS*

## Ĉapitro unua

### *Antaŭdiro de avino*

La jaroj 1836 kaj 1837 estis jaroj de terura malsatego en Japanio. Pluvego inundis la kampojn detruante la grenon. Malsategaj homoj manĝis ĉion imageble manĝeblan, ĝis la ekstremo boligi kaj manĝi la junkan eksteran tavolon de la surplanka mato, por iom prokrasti la konvulsiojn de malsato. Eĉ la riĉuloj havis nenion manĝi kaj multaj mortis pro malsatego havantaj grandan monsumon ĉeflanke.

Ĉie familioj rigardis kun teruro la alvenon de plia buŝo satigenda, kaj forlaso de nedezirataj idoj estis kutima praktikado. Fare de la malstrikta sinteno de la socio kontraŭ tiu primitiva metodo de kontraŭkoncipo, sinsekvaj malsukcesaj grenoj kaŭzis la morton de sennombraj infanetoj.

Tiutempe loĝis en la urbo Fukuĉijama, en la provinco Tamba, tiel nomata Goroosaburoo Kirimura, kiu sekvis la familian tradicion de ĉarpento. Iam la familio Kirimura estis ĉarpentistoj je la servo de la nobluloj, kun la rajto de familia nomo kaj glavo, privilegio kiu kutime estis malpermesata al uloj de subsamura rango. Ili ankaŭ estis zorgantoj de gastigejo kaj ĝuis tre komfortan vivon. Sed ekde la generacio de Goroosaburoo, sinsekvo da familiaj

misfortunoj devigis al la Familio Kirimura vendi sian bienon kaj ekloĝi en malgranda domo.

Goroosaburoo kaj lia edzino Sojo havis du filojn, kaj en 1836, je la pinto de la malsatego, Sojo gravediĝis je tria infano. Tiu okazaĵo kaŭzis familian krizon, kaj Goroosaburoo kaj Sojo kuŝadis enlite flustre parolantaj pri sia dilemo ĝis malfrua nokto. La nura solvo ŝajnis esti forigi la infaneton, ĝis iu nokto kiam la patrino de Goroosaburoo, Takeko, hazarde aŭdis ilian diskuton de proksima ĉambro. Profunde kolerigita ŝi alfrontis ilin dirante “kiel vi povas paroli tiel pri la infano per kiu Dio benis vin! Vi konas la malnovan diraĵon ke infanoj kiuj naskiĝas dum malfacila tempo markos la mondon. Devas esti ia kialo por vi ekhavi infanon en jaro tia ĉi. Ĉi tiu maljunulino havas nur malmultajn pliajn jarojn vivi, kaj se kondiĉoj plej malboniĝos, kompanse lasu nur min malsata. Ĉiukaze, mi ne volas denove aŭdi vin paroli tiel!”

Do, la matenon de la 22a de januaro, en la malbenita jaro 1837, dum la palaj radioj de la matena suno vivigis la montojn de Tamba, Nao Deguĉi, la fondontino de Oomoto, eligis sanan unuan krion.

## *Infanaĝo*

Naskiĝi dum jaro de escepta malsatego kaj je malalta punkto en la familia fortuna nur estis la komenco de la malfacilaĵoj kiuj atendis la fondontinon. Ŝia patro, denaske obstina kaj plendema, ofte praktikis fizikan perforton kiam li drinkis. Kiam Nao aĝis nur du jarojn, Goroosaburoo ĵetis ŝin eksteren en la neĝon de la malantaŭa ĝardeno dum ekkoleriĝo. Denove, kiam Nao aĝis kvar jarojn, ŝia patro sendis ŝin aĉeti rizvinon. Perdita en ludo, ŝi forgesis sian taskon kaj kiam ŝi revenis malplenmane, ŝia patro volvis ŝin en la litotukojn kaj enŝlosis ŝin en ŝrankon.

Ŝia patrino, Sojo, aliflanke estis vere bona virino, ĝentila kaj zorgema pri siaj devoj kiel patrino. Ŝia konduto estis tiel admirinda ke ŝia bopatrino, iom malfacila virino, ofte fanfaronis al la najbaroj pri la edzino de sia filo. La fortan karakteron de Nao, kiu tiom evidentiĝis dum postaj jaroj, sendube je granda parto kaŭzis la infanaĝa zorgo kiun ŝi ricevis de sia patrino.

Dume aferoj pli kaj pli malboniĝis por la familio Kirimura ĝis kiam Goroosaburoo apenaŭ kapablis prizorgi transvivigon, vivante kiel stratvendisto de



speco da dolĉa trinkaĵo farita el fermentita rizo. Fine, en 1846, kiam Nao aĝis naŭ jarojn, Goroosaburoo ekhavis malican ĥoleron, kaj mortis post tago da sufero. La perdo de la manĝakiranto de familio, kiu jam troviĝis en tiel malenviinda stato, estis bato malfacile komprenebla. Kiel rezulto Nao ekservis ĉe rizkomercisto nomita Kanaja en Fukuĉijama.

En la nova ĉirkaŭaĵo, la diligenteco kaj neteco de Nao ŝatatis sin, kaj ĉe la mastro de la domo kaj ĉe la servantoj. Krome, ŝia dediĉiĝo al sia patrino estis elstara. Ĉiom da salajro ŝi ŝparis por Sojo. Dufoje jare la servantoj ricevis novajn vestaĵojn, sed Nao interŝanĝis siajn kontraŭ mono kaj sendis la monon al sia patrino. Tiel admirinda konduto altiris pli kaj pli vastan atenton ĝis kiam la lordo de la feŭdo de Fukuĉijama rekompencis sin per publika aprobo kiam ŝi estis 11-jara.

Post tri jaroj ĉe la rizkomercisto Nao pluiris al dungaĵo ĉe kelkaj aliaj domoj, sed la familo sin ekbezonis ĉe hejme kaj je la aĝo de dek ses ŝi revenis por helpi en la laboro de sia patrino, ŝpinado de fadeno. Pro sia perfektema naturo, onidire, ŝi estis tiel lerta ke ŝia fadeno donis enspezon duoblan ol kutima.

## *Adoptiĝo en la familion Deguĉi*

En lando kie adorado de prapatroj estas fundamenta elemento de la kulturo, malfekunda geedziĝo kreas speciale malfacilan situacion. Se vi havas neniun infanon, kiu do balaos vian tombon kaj honoros vian tabulon sur la familia altaro kiam vi jam forestos? Se vi havas nur filinojn, ili edziniĝos kaj ekzorgos tiajn devojn nur ĉe la familioj de siaj edzoj, kaj via problemo estas same akuta. En Japanio adopto estas la plej kutima solvo de tia dilemo. Se vi ne povas mem ekhavi infanojn, vi estas devigata adopti infanon de pli malproksima branĉo de la familio aŭ eĉ de ekster la familio, por certigi ke post via morto estu iuj kun via familia nomo kiuj povas zorgi tiujn esencajn ritojn. Spiritoj al kiuj mankas tia subteno de la mondo de la mortemaj, laŭkrede iĝos tre venĝemaj fantomoj kiuj ĝenegos siajn antaŭajn familiojn per malsanoj kaj diversspeca malbonŝanco. Tial grave koncernas la tutan familion ke la prapatroj estu bone zorgataj.

En Ajabe, la hejmurbo de Sojo, vivis viro nomita Masagoroo Deguĉi. Havante neniun propran infanon, li adoptis junulon

nomitan Masahei, kiu geedziĝis kun Juriko, pli juna fratino de Sojo. Bedaŭrinde Masahei mortis sen lasi post si infanojn, kaj Juriko petis al Sojo lasi ŝin adopti Nao al la familio Deguĉi por daŭrigi la familian linion kaj tiel servi la prapatrajn spiritojn.

En 1853, kiam ŝi estis 16-jara, Nao adoptiĝis de Juriko en Ajabe, sed ŝi ne bone kongruis kun sia onklino, kaj post ses monatoj ŝi revenis al sia patrino en Fukuĉijama. Iun tagon dum la sekvanta jaro, Juriko senespera daŭrigi la familian linion de Deguĉi, venis al la domo de la familio Kirimura kaj minacis fantomumi ilin post sia morto se ne Nao revenos al la Deguĉi-familio. Tiun vesperon, Juriko sindronigis en puto.

Tiutempe, tiel nomita Giemon el komunumo proksima al Fukuĉijama deziris edzinigi Nao, kaj Nao ŝajnis konsentema pri la aranĝo. Post suferado de serioza malsano, tamen, timigita de la minaco de la onklino, ŝi rezignis por iri al Ajabe. Do, en 1855, je la aĝo de dekok, Nao revenis al la familio Deguĉi. En la sama jaro, la familio adoptis tiel nomitan Tojosuke Ŝikata, kiu ŝanĝis sian nomon al la familia nomo de Masagoroo Deguĉi, kaj li kaj Nao geedziĝis la 20an de marto.

## *La edzo de la Fondantino*

Antaŭe nomita Tojosuke estis ĉarpentisto kaj 28-jara kiam li aniĝis al sia nova familio kaj geedziĝis kun Nao. Li prenis kun si tri lernantojn kaj konsiderindan ŝuldon.

Masagoroo, kiel li nomiĝis, estis tre amuziĝema ulo kaj granda ŝatanto de rizvino, da kio estas rakontate ke li trinkis du kvartojn ĉiutage. Dum li drinkis al li plaĉis amuzi ĉiujn per senfina repertuaro da kantoj kaj ŝercoj. Lia laboro kiel ĉarpentisto tamen estis elstara kaj tre dezirata en la regiono. Bedaŭrinde li estis tiom nature donacema kaj tro kontentema, ke li ofte malgajnis en siaj diversaj projektoj, kaj li ankaŭ havis inklinon liberigi siajn lernantojn antaŭ ol ili havis tempon repagi al sia majstro la insruadon de sia lerteco.

Tamen la novgeedziĝintoj sukcesis vivi komforte unue, eĉ konstruante novan domon tuj post la geedziĝo. Tia feliĉo ne daŭris longe. La konstantaj neglektado kaj miskontrolo de Masagoroo pri familia ekonomio kaj lia propra troa donacemo al konatoj kaj parencoj, kondukis la familion laŭ malsukcesiga vojo ĝis ruiniĝo.

Laŭ la malapero de iliaj rimedoj, la

nombro de infanoj kreskis. La jaron post ilia geedziĝo la filino Joneko naskiĝis, sekvota de tri infanoj kiuj mortis infanaĝe. Sekve venis dua filino, Kotoko, filo, Takezoo, tria filino, Hisako, dua filo, Seikiĉi, tria filo, Denkiĉi, kvara filino, Rjooko, kaj la 3an de februaro, 1883, en la tago de Secubun, kiam Nao estis 46-jara, la kvina filino, Sumiko naskiĝis. La lasta filino estis la venonta spirita gvidantino de Oomoto.

## *Malriĉeco*

Dume, la ŝuldoj de la familio kreskadis kaj fine ili devis vendi sian domon kaj transloĝiĝi al luata loĝejo. Kelkan tempon ili klopodis mastri tavernon, suplemente sian enspezon vendante rizkukojn. Ĉiun nokton Nao mueladis ok kvartojn da rizo per ŝtonaj manmuelieto kaj pistilo, por produkti rizfarunon por la kukoj. Tion ŝi faris kun la juna Rjooko ligita surdorse kaj la infaneto Sumiko ĉebruste. Hisako kaj Seikiĉi enskatoligadis la kukojn kaj iradis por petvendi ilin surstrate.

Dume, la drinkema Masagoroo estis en siaj vintasoĵ. Trinkante rizvinon li

ĝuis prezentojn de parodioj kaj kantado kiujn vagantaj muzikistoj venigis al la vilaĝo. Nao faris por li manĝopakaĵon kaj li forestis la hejmajn okazaĵojn. Unu tia grupo onidire tiel fascinis lin ke li sekvis ilin ĉirkaŭe en la urbo kaj al ĉirkaŭaj vilaĝoj, sen reveni hejmen dum dudek tagoj.

Tra la tuta malfacila tempo Nao restis sindona al sia edzo, obeeme aŭskultante ĉiun lian deziron kiom ajn malobeindan. La harmonio kiu regis en la hejmo estis modelo por la najbararo, kaj post la morto de Masagoroo, Nao ofte diris ke ŝia nura pento estas ke ŝi neniam havis monon enstoke havi por sia edzo plenan barelon da rizvino.

## *Katastrofo trafas*

En 1885 kiam Nao estis 48-jara, Masagoroo falis de la tegmento de domo kiun li riparis, grave vundante sian pelvon. La damaĝo, severe malbonigita de konstanta drinkado, komplikiĝis pro paralizigo, kiu tiom severiĝis ke li tri jarojn kuŝadis sen povi moviĝi.

Problemoj neniam venas unuopaj, kaj tiel estis por la familio Deguĉi. La



plej maljuna filo, Takezoo, tiam studis ĉarpenton ĉe tiel nomita Kiĉizoo el Koomura, sed li laciĝis je sia profesio kaj okazigis grandan tumulton provante sin mortigi. La provo estis sensukcesa sed li tamen sin grave vundis.

Tiel, en tempo kiam neniu sciis de kie venos la venonta manĝo, Nao iĝis zorganto de du kripluloj, jam estante nutranto de siaj ok infanoj. Dum la akra malvarmo de la vintro, la tuta familio kuniĝadis sub maldikige uzita kovrilo. Kiam venis somero, ĉar la moskitoreto jam delonge estis vendita por aĉeto de medikamento, Nao restadis veka plejparton de la nokto bruligante morusarbajn radikojn, forpelante la moskitojn por ke la junaj infanoj povu dormi. Dume Masagoroo estis kiel ĉiam nezorgema, englutanta kaj ŝercanta, de tempo al tempo ekaŭdigante kanton.

Senespera pri kiel nutri la familion, Nao fine ekhavis la ideon kolekti ĉifonojn kaj forĵetitan paperon. Ĉar estis eksterdoma laboro, ŝi devis lasi la du kriplulojn kaj la infanojn hejme. Tra tiu ĉio neniam ĉesis ŝia sindonemo kaj ĝentileco, kaj ŝi neniam eliris la domon sen demandi al sia edzo ĉu estas io kion ŝi akiru por li. Kaj do, finfine, eĉ la senzorga Masagoroo estis profunde kortuŝata pro la sindonemo

de sia edzino, kaj li diris, “Mi ĉiam faris kion mi volas sen zorgi pri iu alia, kaj nun Dio punis min. Kiam mi pensas pri via ĝentileco, tio venigas larmojn al miaj okuloj.”

La malfacilaĵoj kiujn spertis Nao dum tiuj jaroj estas preskaŭ neimageblaj. Ĉiumatene Hisako faris por ŝi rizboligaĵon, sed Nao ĉiufoje diris, “Mi ne bezonas ĝin. Vi manĝu ĝin.” Aŭ ŝi portis ĝin eksteren kie Rjooko kaj Sumiko ludis kaj ĝin donis al ili. Iam, survoje hejmen de longa irado al Mijazu por aĉeti ĉifonojn, grimpante la krutan deklivon de la pasejo Fukoo, en falanta neĝo kun malplena stomako, kie ŝi kuŝadis preskaŭ mortonte ĝis ŝi finfine estis savita de preterpasanto.

Nekredeble, sed tamen, en la malprofundo de malriĉeco kaj okupita pri la malpura laboro de ĉifonkolektado, Nao neniam permesis al si aspekti malorda. Ŝi estis malindulgema pri vestolavado, kaj la virinoj en la urbo menciis ke Nao aspektas pli bela en sia flikita kaj per rizo rigidigita vestaĵo ol aliaj homoj en siaj plej bonaj vestaĵoj.

Iam kiam ŝia filino Hisako laboris kiel servisto en loko nomita Jagi, Nao, je senespera bezono, englutis sian honoron kaj, por pruntepreni monon, vizitis la familion ĉe kiu ŝia filino estis dungita. La

mastro de la domo demandis la servistino trifoje, “Ĉu vere tio estas via patrino?” tiel malfacile li povis kredi ke virino kun tiel rafinita aspekto sendis sian filinon elhejme por labori kiel servisto.

## *La forpaso de Masagoroo*

En la tria jaro de lia malsano kaj nur monaton post novjaro, la stato de Masagoroo pli malboniĝis, makuloj aperis sur liaj brakoj kaj gamboj, kaj eĉ Nao komencis dubi ĉu li iam resaniĝos. Tiam Masagoroo petis al sia edzino, “Vi zorgas min longan tempon, sed ŝajnas ke nun venas la fino. Ĉu vi opinias ke mi povus havi tason da rizvino je la disiĝo de tiu ĉi mondo?”

“Kompreneble, kompreneble,” respondis Nao. “Mi tuj iros havigi al vi tion. Dume vi klopodu klarigi viajn pensojn kaj bonvolu ne plu paroli tiel! Urĝinte ĝis la pordo, ŝi haltis ekkonsciinte ke ŝi havas neniom da mono. Senespere rigardanta ĉirkaŭen en la domo, ŝi ne povis trovi ion por interŝanĝi kontraŭ mono, ĉio interŝanĝebla jam de longe foriĝis.

Fine ŝi ekvidis la malnovan pesilon, la ilo por ŝia laboro de kiu dependis la bonstato de la tuta familio. Portinte la pesilon al la interŝanĝejo, ŝi demandis pri prunto da tri senoj (1 seno = 1/100 da eno), nur por esti informata ke ĝi ne havas tioman valoron. Fine ŝi sukcesis pruntepreni du senojn de siaj ĉifonkolektantaj amikinoj, kaj per tio ŝi aĉetis rizvinon por Masagoroo. Post ŝia hejmenveno, gustuminte la rizvinon, Masagoroo estis tre ĝoja kaj diris, “Bonguste! Bonguste! Nun mi havas nenium penton.”

Kaj tiel, la unuan de marto, 1887, post longa suferado, Masagoroo forpasis je la aĝo de sesdek. Surgenue ĉe la flanko de sia edzo, Nao ploris, petante ke la dioj lasu ŝin akompani lin en la longa vojaĝo.

La enterigo okazis per minimuma ceremonio.

(daŭrigota)

kvara parto

**LA SPIRITA MONDO ESTAS LA ORIGINO DE EKZISTO**

2

Hidemaru Deguči, tradukis Eizo Itoo

***La spirita mondo estas la radiko kaj la reala mondo estas la branĉaj folioj***

La spirita mondo ne ekzistas sen la bazo kio estas la fizika mondo, kaj la fizika mondo ne formiĝas sen direktado el la spirita mondo. Ĉi tio estas sama kun la fakto, ke unu papero havas du flankojn frontan kaj dorsan. Sen harmonio kaj ordo inter la du mondoj neniel povas esti paco nek feliĉo. La rilato estas ĝuste la sama kun tiu inter la koro kaj la korpo.

La spirita mondo estas en la fizika mondo, ĝuste kiel la koro estas plenigita en la korpo. Kiel la korpaj okuloj ne povas vidi la koron, tiel same oni ne povas fari instrukcion al la spirita mondo laŭ la okuloj de la fizika mondo. Kiel la koro povas senlime grandiĝi aŭ malgrandiĝi kaj estas tute super la fiziko rilate la tempon, la spirita mondo havas ĝuste la samajn

ecojn. Kiel la korpo estas manifestiĝo, bildo aŭ modelo de la koro, tiel same la fizika mondo estas manifestiĝo, bildo aŭ modelo de la spirita mondo. La rilato inter la fizika kaj la spirita mondoj estas tute sama kun tiu inter korpo kaj koro.

Unuflanke kontraŭstaras la fizika mondo kaj la spirita, aliflanke ili korespondas inter si.

Laŭ vasta senco de la vortoj, la tuta universo estas spirita mondo. La fizika mondo estas spirita regiono bazita sur la materio.

Senlimaj estas la vojoj ligantaj la fizikan kaj la spiritan mondojn.

En la fizika mondo speguliĝas kaj la Dia regiono kaj la malluma regiono.

Kiel la aero estas plena en la natura mondo, tiel same la spirito plenigas la spiritan mondon. Kiel malpurigita aero pli multigas malsanulojn, tiel same malpurigita spirito naskas multajn



spiritajn malsanulojn.

Se la homaj pensoj estas malpuraj, nature malpuriĝas la ĝenerala spirita atmosfero kaj tio malpurigas la tutan mondon. Tial la plej grava afero por ĉiu homo estas purigi sian koron. Nur se tio plenumiĝos, la tuta socio estos feliĉa, eĉ se ĝi ne havos elektrajn veturilojn aŭ flugmaŝinojn.

En interrilatado kun iu persono dum iom da tempo, nature klariĝas lia karaktero kaj tio okazas neniel nur pro observado de liaj eksterajoj, sed originale pro la interna interkomunikiĝo kun li. Do absolute neniu povas kaŝi sian nunan koron.

Ĉar unuavide ne aperas en iu formo la interno, homoj trankvile afektadas antaŭ si reciproke. Sed tio, kion homo efektive nun pensas en la koro, neniel povas resti sen speguliĝi iam en la koro de homo, kun kiu li havas rilaton. Tio estas tre grava ankaŭ koncerne la edukadon. La personeco de la instruisto rekte influas la disĉiplojn.

Io grava okazinta en la spirita mondo, iam povas aperi kaj finiĝi en la fizika mondo nur en formo de bagatelaĵo kaj ankaŭ inverse.

Sed ĉio okazinta en la spirita mondo nepre okazas ankaŭ en la fizika mondo, kiel aperas bildo responde al la figuro, resonon

responde la sonon.

Sen estiĝo de spirita fenomeno, neniam estiĝas fenomeno en la fizika mondo, kaj ĉi tiu lasta ĉiam okazas sekvante la unuan. Naskiĝo de infano okazas kiam ĝi eliras el la patrina ventro, sed oni povas diri, ke ĝi jam naskiĝis kiam okazis la koncipito.

La eltrovo kaj apliko de la elektro sugestas la alvenon de la periodo de kosma kompletiĝo. Lastatempe oni povas sendi al fora loko per senfadena elektro eĉ desegnaĵojn kaj portretojn. Se oni ekscias la mekanismon de ĉi tio, oni povas facile kapjesi la fakton nome telepation, ke homa penso atingas la koron de malproksima homo kaj ke iafoje aperas antaŭ okuloj la portreto de iu, kiu loĝas en malproksima loko.

Ĉar la ekstremo de materia rafinaĵo estas la homa korpo, kaj tiu de spirita rafinaĵo estas homa animo, povas esti ke post ne longe ni povos interparoli kun homoj malpriksime loĝantaj tute libere, sen uzi komplikajn maŝinojn kaj ekipaĵojn. Verdire, tio jam okazis de la praantikva tempo, kvankam homoj ne sciis la mekanismon, nek havis la memkonscion pri tio.

Kiam la homoj atingos la menciitan staton, ankaŭ solviĝos problemoj, kiamaniere

okazas la speguliĝo de afero en la spirita mondo al la fizika mondo.

Estas vaste konate, ke necesas sufiĉe longa tempo por ke afero okazinta en la spirita mondo aperu en la fizika mondo. Kredeble la longeco de l' tempo proporcias al la nombroj de l' spiritaj mondoj, kiujn devas trapasi la spirito.

Se iu klare antaŭvidis la staton de la nuna mondo jam antaŭ trimil jaroj, li siatempe vidis tre profundan spiritan mondon. Se nuntempe iu povas profeti la scenojn de la fizika mondo post kelke da miljaroj, li nun vidas spiritan mondon situantan fore en granda distanco.

La fizika mondo estas la bazo, sur kiu stariĝas la spirita mondo, aŭ alivorte la modelfiguro, en kiu enloĝiĝas la spirita mondo.

Tial neniam rompiĝos la fizika mondo tiom longe, kiom restos la spirita mondo senrompe. Cetere, ĉar la spirita mondo estas senlima, ankaŭ la fizika mondo neniam pereigos, kvankam ĝi spertos senlimajn ŝanĝiĝojn. (Ĉi tio signifas ke eĉ se la nuna terglobo iam pereigos, nepre naskiĝos nova anstataŭonta modelfiguro por la spirita mondo.)

La grandeca rilato inter la spirita mondo kaj la fizika estas komparebla kun tiu inter

reala lando kaj ĝia geografia karto aŭ tiu inter la reala monto Fuĵi kaj ĝia foto.

Sed ambaŭ mondoj spirita kaj reala ĉiam restas nedisigeble kunkune, ne kiel la reala lando ekzistas aparte de la geografia karto kaj la reala monto dis de la foto. Por tiel diri, sur la geografia karto de Tokio kuŝas la reala urbo Tokio, kaj sur la foto samtempe staras la reala monto Fuĵi.

Por mildigi la malfacilecon de la kompreno, mi povus ekspliki ekzemple kiel jene: laŭ nete materiala vidpunkto jen estas nur geografia karto kaj foto, sed laŭ spirita vidpunkto tie fakte kuŝas la urbo kaj staras la monto.

Unuvorte, ĉiu loko havas sian propran spiritan mondon. Diferenco de la spiritaj mondoj ĉiuloka signifas diferencon vertikalan nome ŝtuparan. Ekzemple komparante la urbojn, Oosaka kaj Kobe, kvankam ne rimarkebla estas la diferenco vertikala geografie, laŭ spirita vidpunkto ili havas klaran diferencon de la direkto kaj de la alteco supernivela.

Eĉ sama loko aŭ sama ĉambro havas diferencon spiritan regionon laŭ la homoj, kiuj tie kolektiĝas kiel ankaŭ laŭ la aranĝoj, kiuj ĝin ornamas.

Jen kompreneblas la kialo de la ŝanĝiĝo de nia temperamento laŭ la loko, kie

ni troviĝas kaj laŭ la homo, kiun ni renkontas.

Iu medio en la fizika mondo estas bazo de certa spirita regiono. Ekzemple la ŝintoa sanktejo estas tiel diri la baza konstruaĵo de la loĝejo de certa dispirito dum la tombo signifas tiun de homa animo postmorta. Tial se homo intence blasfemas sanktejon aŭ tombon, ofte li ricevas punon rekompence.

Ĉiu objekto de la fizika mondo estas senescepte la bazo de certa afero de la spirita mondo alivorte ĝia plej malalta ekstremo.

Kiel ekzemple pensu pri unu domo. Eĉ se ĝi mem propre ne havas rimarkeblan spiriton, ĝi certe havas enloĝantojn. Kiam ne estas enloĝantoj, nepre troviĝas tamen ĝia posedanto. Eĉ nun ial troviĝas neniu posedanto, certe ekzistas homo, kiu ĝin konstruigis por ia celo. Tial se iu aŭdacos abrupte eniri en ĝin aŭ ĝin rompi sen peti permeson, nepre koleros la enloĝantoj aŭ la posedanto aŭ la konstruiginto. Tute sama kun unu krajono, unu libro, unu tranĉilo, kampo, arbaro, monto ktp. Ĉio apartenas respektive al iu spirito. Alivorte ĉio formas la plej malaltan ekstremon (aŭ plej foran periferion) de iu spirito. Ekzemple, kvankam la vesto

ne estas homo mem, ĝi tamen formas la plej eksteran parton de lia korpo, kiam ĝi estas surportata de li. Tial se iu intence malpurigas lian veston, li koleras ofendita, kvankam lia animo ne rekte ricevis ian baton.

Pro ĉi tiu rezono, ni devas respektive trakti ĉiun forman objekton same kiel spiriton, kondiĉe ke ni ne enfalu en adoro de formaĵo neglektante la ordon, ke unuavice grava estas la spirito sed ne la formaĵo.

Se ni atente observas, ni ofte trovas gravan signifon en iu bagatelaĵo aŭ en simpla vorto eldirita de homo.

Nenio en la mondo estas hazardaĵo. Per atenta observado de diversaj aferoj, oni povas malkovri la sencon, kiun respektive ĉiu en si enhavas.

Kial mitoj kaj legendoj havas tre grandan valoron laŭ spirita vidpunkto? Unue ĉar ili tenas en si ion, kio nepre tuŝas iel la profundon de la homa animo en la diversaj tempoj, kiujn ili trapasis senĉese rakontataj jam de la praantikveco. Due ĉar ili ĉiuj elvenis pere de la pensoj de puranimaj antikvuloj kaj ĉar tiuj pensoj estas elfluaĵoj el la spirita mondo. Kvankam supraĵe ili aspektas sensencaj fabeloj, ili enhavas tre ravajn spiritajn sugestojn.

Ĉiu objekto aperinta en la Naturo respektive prezentas spiritan sugeston. La vizaĝo estas la speguliĝo de l' koro, kaj la fizika mondo estas fotaĵo de la spirita mondo.

Kiam B kaj C troviĝas kune en sama loko kaj A, aparte loĝanta, eksentas malamon aŭ amon al C, foje okazas, ke B iel eksentas malamon aŭ amon al C. Tiam B fariĝis modelfiguro aŭ anstataŭaĵo de A. Kiam edzino, pensante pri sia edzo eksterdoma, kisas sur vango de sia infano, tiam la infano fariĝis la modelfiguro de ŝia edzo. Kiam homo, subite koleriĝinta, forĵetas iun objekton troviĝantan ĉe la homo aŭ afero, kiu kaŭzis la koleron.

La fizika mondo estas la modelfiguro de la spirita mondo kaj la homo estas tiu de la spirito. La homo povas esti spirite kulturata, nutrata kaj instruata nur per tio, ke li fariĝas modelfiguro de iu spirito.

La rilato inter la originalo kaj ĝia modelfiguro estas des pli bona, ju pli densa estas ilia korespondeco. Ekzemple kiam homo forĵetas iun objekton pro ekkolero, dezirinde estas, ke la objekto estu kiel eble plej dense rilata al la persono, kiu kolerigis. Ni ordinare faras preĝon al Dio petante Lian favoron por resaniĝo de iu persono, metante antaŭ ni lian foton aŭ

veston, kiel lian modelfiguron.

La malsano de homo estas ofte kaŭzita de malpuraĵo de postmortaj animoj de prapatroj. Iuj riproĉas la prapatrojn, ke ili turmentas la posteulojn per malsanigo. Eraras la riproĉo, ili neniel intencas turmenti la posteulojn, sed ilia sufero en la spirita mondo neeviteble speguliĝas en la fizika mondo kaj rezultiĝas en malsano.

Tio estas fenomeno sama al tio, ke, se malpuriĝas la fronta flanko de papero, konsekvence malpuriĝas ankaŭ ĝia dorsa flanko kaj ke, se oni forte tiras unu ekstremon de fadeno, konsekvence la alia ekstremo ankaŭ tiriĝas en sama direkto.

Ĉio estas sub la principo de unueciĝo de videblaj kaj nevideblaj aferoj. La fizika mondo kaj la spirita al si reciproke influas. Tial, se la animoj de prapatroj en la spritia mondo progresas al pli bona situacio, nature favora vento blovas sur la vivon de iliaj idoj en la fizika mondo. Inverse, se la idoj en la fizika mondo bonkonduktas laŭ Dia Volo, la prapatraj animoj en la spirita mondo ne povas ne ricevi ilian bonan influon.

Do ni homoj en la fizika mondo devas ĉiam bonkondukti obeeme al Dia Volo kaj kiel eble plej respektive adori Dion kaj prapatrajn animojn. Se ni ofte faras



elkorajn diservojn preĝante bonon de la prapatraj animoj, memkompreneble ili tiom pli ĝojas kaj kuraĝiĝas en la spirita mondo.

Ĉi tie tamen ni devas atenti unu punkton, ke la spirita mondo nepre estas la iniciata dum la fizika mondo sekvanta, kavankam estas principo de korelativeco de ambaŭ.

Ekzemple ni povas laŭ nia volo konstruigi domon kaj fari ilojn por ĉiutaga vivo, sed ni samtempe ricevas influon de ĉi tiuj objektoj faritaj de ni mem.

Jes, spirito kreas materiaĵon, sed ĝi ricevas influon de la materiaĵo kreita. Sed ĉar absolute spirito estas la primara dum materio estas la sekvanta, oni devas pli bonigi la korpon por akiri pli bonan materiaĵon. Kontraŭorde estas, se oni volas pli bonigi la koron per pli bonigita materiaĵo.

Tragedion kreas ne la sorto, sed sencio, alkroĉiĝo kaj deprimiĝo.

Kvankam la sorto trudas al la homa vivo, kiel la printempon io trudas transiri al la somero, ĝi ne estas tiel rigora, kiel la maŝineca leĝo de la naturo. Laŭ korteniĝo de la homo ĝi trudas aŭ minimume aŭ maksimume.

Ekzemple du personoj A kaj B ricevis baton de sama vipo de la destino. Dum A

sentis nur momentan, malgrandan doloron ĉar li estis tute preta por la bato, B devis senti longdaŭran, preskaŭ netolereblan doloron, ĉar li estis embarasita, memkonsciis ekstreman ofendon kaj atendis intensan dolorecon. Por tiel diri, A malgrandigis la doloron ĝis minimumo per sia sinteno kaj B mem invitis al si kiel eble plej grandan doloron—maksimuman. Se diri tion laŭ la fizika leĝo de la Naturo, du preskaŭ samspecaj objektoj devas prezenti preskaŭ saman rezulton kontraŭ sama bato.

Sed kiam rilatas la spirita mondo, aperas tiel ekstreme granda diferenco, kiel jam menciite. La destino neniel trudis ĝuste tiel, kiel okazis la afero. Nur responde al la korpreteco de la homo, la afero montriĝas multe pli serioza aŭ multe malpli.

Ĉiuj bataloj en la homa historio estis speguliĝo de bataloj en la spirita mondo.

La unua paŝo al la vera edukiĝo estas ekkoni la ĝeneralajn trajtojn de la sistemo de la universo, regata de la principo de unueco de la spirita mondo kaj la fizika aŭ de korelativeco de la interno kaj la ekstero.

## *Spirita sensivo kaj miraklo*

Kiel ni, per la kvin sensorganoj povas percepti aferojn de la reala mondo en certa kadro, tiel same ni devas havi la eblecon senti la spiritajn aferojn en iu kadro per nia spirita sensivo. Kvankam estas neeble precize kapti la spiritajn aferojn, ĉar nia sensivo estas multe materizita, ne tiel malfacile estas senti la atmosferon, nur se ni nin metas en trankvilan situacion.

La homaj koroj tre vigle kaj konekse reagis al si reciproke, tial, nur se homo povas sin teni en plena trankvileco senafekta, al li sentiĝas la penso de apudestanto tiel klare, kiel oni vidas bildon en spegulo.

Se ni kunestas kun senafekta infano, nia koro fariĝas tre serena kaj gaja; se ni kunestas kun suspektema mezaĝulino, nia koro fariĝas iel malgaja; se ni kunestas kun maljunulo, ni mem fariĝas iel maljunulecaj; se ni kunestas kun saĝulo, naskiĝas ia saĝo per si mem en ni, ktp.

Kiam alvenas al mi iu homo, kiu memoras ion, kion mi estas tute forgesinta, nature tio reaperas en mia konscio. Ofte okazas ankaŭ tio, ke apudestanto preparolas ĝuste la aferojn unu post alia, kiujn mi volis paroli.

Homoj devas atingi la staton, en kiu ĉiuj

liaj agoj senescepte venas el la interneco. Evitende estas havi diversajn planojn aŭ intencojn per sia egoo. La koro estu ĉiam simpla kiel pura akvo por ke ĝi klare spegulu en si bildojn el la spirita mondo.

Nur tenu koron similan al blanka papero aŭ pura akvo. Kiam speguliĝas sur ĝi ia bildo, koncentru la koron ekskluzive al ĝi, kiel infaneto estas absorbita per unu afero. Nuntempaj homoj disigas la koron al diversaj objektoj, ne povante koncentri la tutan koron al unu sola afero. Pro tia malekonomia uzo de l' animo ili povas ellabori nenion vere valoran.

Nur se nomo tenas puran koron, li povas kapti la veron per la unua intuicio. Sed se li rejuĝas la intuicion per diversaj nomecaj konsideroj, li fine perdas la tutan lumon. Kiam homo volas diveni la Dian Volon per orakolbileto, li decidu per la unuavice eltirita bileto, anstataŭ provi la duan aŭ trian fojon.

Lastatempe tre vigliĝis la studado pri spiritaj aferoj pere de spirita sensivo ne nur en Japanio, sed eĉ pli rimarkinde en Eŭropo kaj Usono. Eldoniĝis ankaŭ multaj libroj tiurilate. Sed oni devas scii, ke Dikredo kaj spitia sensivo estas apartaj aferoj.

Estas homoj, kiuj vivas kun tre alta

Dikredo, kaj mem pensas, ke ili ne posedas spiritan sensivon. Ili eraras. Ili posedas iuspecan propran sensivon spiritan, nur ne tre rimarkindan. Aliflanke oni ne devas facilanime pensi ke iu estas homo de nobla Dikredo, ĉar li posedas spiritan sensivon. Estas multaj klasoj de spirita sensivo, de tre alta klaso ĝis malalta klaso. Kiam homo estas kaptita per malaltklasa sensivo spirita, li fine devojiĝas ankaŭ en la Dikredo. Ĉi tion ni devas klare scii. Por juĝi la klasojn de ies sensivo spirita la plej bona populara rimede estas observi liajn sintenon kaj personecon. Se ĉi tiuj estas noblaj, li havas altklasan sensivon; se ne, malaltklasan.

Estas diversaj karakterizaĵoj de la spirita sensivo. Homo kun vida sensivo vidas spiritajn figurojn kaj diversajn scenojn de la spirita mondo, dum homo kun aŭda sensivo aŭdas parolojn de spiritoj aŭ voĉon de Dio aŭ de iaj spiritaj estaĵoj. Troviĝas ankaŭ homo, kiu parolas per parola sensivo ion, kion li mem ne volas. Mi volas rekomendi tian spiritan sensivon, ke homo iel sentas intuicie. Li spirite nenion vidas, nenion aŭdas nek ion eldiras senvole, sed iel li rekte sentas fortan tuŝon en la profundo de la animo, kvankam li tute ne scias, de kie tio venas. Kiam

li progresas ĝis kapti la intuicion kun certeco, tiam la intuicio montriĝas fidinda kaj senerara.

Mirakloj aŭ profetaĵoj neniel povas konverti homojn. Ili estas permesataj aperi nur kiel rimedoj por sciigi al homoj de la fizika mondo pri la ekzisto de la spirita mondo. Per mirakloj aŭ profetaĵoj oni ne povas konverti nek savi la homojn. Ĉiu homo estas dotita per sia animo, racio kaj libereco de ago. Se li decidus ion kaj ekagus per miraklo aŭ profetaĵo, li fariĝus simpla maŝino, senigita je libereco aŭ racio.

Estas vero, ke la fizika mondo estas manifestiĝo aŭ bildo de la spirita mondo, sed se la homaj koroj submetiĝus de mirakloj aŭ profetaĵoj, ili perdus la kapablon mem decidi pri sia ago, nur dependante de mirakloj aŭ profetaĵoj. Tiamaniere homoj malhelpus al si la internofluon el la spirita mondo kaj ne povus plenumi sian mision en la fizika mondo, perturbante la ordon de Dio starigitan. Homo, kiu kredas miraklon, eble dezirus atingi la celon per ia magia rimedo, anstataŭ per deca klopodo. Iuspecaj profetoj eble atendus mirindan rezultaton sen necesa procedo. Plejparto da homoj, kaptitaj de la egoismo, sendube

dezirus uzi la miraklojn aŭ la profetaĵojn nur por sia memama celo kaj tiel disfalus la tuta ordo de la socio.

Nu, homo devas antaŭ ĉio kredi la ekziston de la spirita mondo kaj kompreni, ke la fizika mondo estas nur ĝia manifestiĝo kaj tamen samtempe, sentante kaj pensante en la kadro permesita al homo, klopodi por kompletigi sian propran personecon laŭ la bona senco de la vortoj. Tio necesas kaj samtempe tio

sufiĉas.

Eksperimento apartenas al homo, intuicio al Dio. Tial la eksperimento estas ĉiam kondukata de la intuicio. Ne estas eksperimento ekster intuicio.

Homo povas formi sian volon nur per sia propra inspiro. Alies argumentoj estas nur rimedo por helpi la inspiro.

*Aŭditorio en Miroku-Domo*

